CxEA-retkomunikoj 2/2002

ENHAVO:

1. Sxangxo de la dato de CxEA-kongreso
2. Humphrey Tonkin inter ni
3. Printempaj E-arangxoj en Cxehxio

## 1. SXANGXO DE LA DATO DE CXEA-KONGRESO

la deka kongreso de CxEA estis planata al la dato 2002-11-22/24. Bedauxrinde nur post la publikigo de la dato ni eksciis, ke la 21-a gxis la 22-a de novembro okazos en Prago la pinta kunveno (summit) de NATO kaj ke jam nun estas preparataj kaj grandaj planoj de ties defendo unuflanke, kaj de internaciaj protest-arangxoj duaflanke. Kiu travivis en Prago  la konferencon de la Monda banko ne miros, ke ni esperantistoj, respektante nian malfortecon kompare kun NATO, cedis, do:

La nova dato de la 10-a kongreso de Cxehxa Esperanto Asocio en Prago kunigita kun la solenajxo de 100-jara datreveno de Praga E-klubo okazos de la 15-a gxis la 17-a de novembro 2001. Pli precizajn informojn kaj aligxilojn vi povos baldaux trovi en la TTT-pagxo de CxEA (www.kuk.cz/cea) aux de Starto (www.clavis.cz/starto).

## 2.  HUMPHREY TONKIN INTER NI

Prof. Humphrey Tonkin el Usono, vicprezidanto kaj eksprezidanto de UEA, estos meze de aprilo pro oficaj aferoj en Prago. Malgraux sia plensxtopita programo li afable pretas veni inter nin por povi konatigxi kaj diskuti kun la cxehxa esperantistaro.

La diskuto okazos marde la 16-an aprilo, je 17:00 en klubejo de la nova hotelo Mucha apud la metroostacio Sokolovská (proks. 100 m lauxlonge la Sokolovska strato direkte al Karlin). Pro bonaj rilatoj kun la posedanto de la hotelo ni ne bezonos pagi la luprezon de la salono kaj malgraux kvarstela nivelo ni povas ricevi ankaux speciale favorpreze simplan vespermangxon - sed necesas scii, kiom da personoj proksimume venos kaj kiom da ili deziros tie ankaux vespermangxi. Estos nenia kotizo, cxiu pagos nur tion, kion sxli mendos.

Vian intereson partopreni la kunvenon kun H. Tonkin bv. sendi al <chrdle@kava-pech.cz> kaj vi ricevos sekve pli proksimajn informojn, memkomprene ankaux se okazos eventualaj sxangxoj.

## 3. PRINTEMPAJ ESPERANTO-ARANGXOJ EN CXEHXIO

Ni rememorigas al vi la arangxojn dum printempo 2002 kun aldono de la retadreso, kie vi povas ricevi pliajn informojn kaj aligxi, aldonante informon pri la somera karavano al UK, cxar baldaux ni devos nuligi la superflue menditan flugrezervigon:

22.-24.3. RAVE 3, Vyškov, <vojacek@jumbo.ped.muni.cz>

13.4. Turisma ekskurso al Zruč nad Sázavou kun geesperantistoj el Benešov, <stiburek.v@c-mail.cz>

19.-21.4. 11-a Adonido, pilgrimado al rara kreskajxo Adonido kun vespera programo en vinkelo, konkurso en keglado, Vracov, <melicharkova@quick.cz>

22.-28.4. Esperanta seminario de AHE (Asiocio de esperantistoj handikapitoj) en Skokovy, <drahotovaesperanto@seznam.cz>

7.-9.6. Paroliga kurso kun paralelaj Ekzamenoj pri scio kaj ekzamenoj prim kapablo instrui de CxEA. Poděbrady, <melicharkova@quick.cz>

11.-16.6. EKOTUR (Internacia ekoturisma renkontigxo), Kvilda (Sumava), dumtage piedekskursoj en du grupoj: pli sportemuloj kaj ripozemuloj, paralele kun vesperaj programoj por esperantistoj okazos enkonduka kurso de Esperanto por neesperantistoj <chrdle@kava-pech.cz>

1.-16.8. Flugkaravano al Brazilo kun partopreno de UK en Fortaleza. <chrdle@kava-pech.cz>